« Unuiĝintaj Nacioj deklaris "2016, année internationale des légumineuses", t.e. "2016, international year of pulses", aŭ "Año Internacional de las Legumbres" (vidu http://www.un.org/fr/sections/observances/international-years/index.html).

La faka organizaĵo pri nutrado kaj terkultivado (FAO) havas retpaĝojn pri tio (http://www.fao.org/pulses-2016), en kiu oni trovas elŝuteblajn dosierojn de la oficiala logotipo en multaj lingvoj : http://www.fao.org/pulses-2016/communications-toolkit/download-iys-logo/en/

Mi retmesaĝis al FAO por peti ankaŭ meti esperantan logotipon, proponante "2016, internacia jaro de guŝsemoj". Mi konscias ke la vorto guŝsemo ne tute taŭgas, sed mi ne trovis pli bonan, ĉar laŭ la oficiala regulo de tiu internacia jaro, temas pri semoj de plantoj el la familio Fabacoj, uzataj por nutri homoj kaj bestoj.
Do, de hodiaŭ, vi povos elŝuti de la oficiala ret-paĝo de FAO la esperantan logotipon, laŭ formatoj .jpg (granda aŭ malgranda), aŭ .pdf.

Mi pensas ke tio estas interesa por la esperanta movado, ne nur ĉar estas kelkaj vortoj en esperanto en oficiala paĝo de internacia organizaĵo, sed ankaŭ ĉar guŝsemoj estas grava afero por ni, por la tuta homaro, do por ĉiuj esperantistoj.

Mi deziras al vi ĉiuj bonan guŝseman jaron, kiu estos ne nur sem-dona, sed ankaŭ fruktodona jaro.

Pierre Dieumegard. »